

Ora Ĵurnalo

Numero 11, Oktobro 2018

Al la tuta mondo:

Bonvenon al la verda Gotenburgo!



Bonvolu viziti nian retpaĝon:

www.esperanto-gbg.org

Enhavo

Enhavo.....	2	El la tuta mondo sur la Globala Foiro	24
Espeporko konstatas.....	3	Interesa statistiko pri lingvoparolantoj.....	25
Mirindaj tagoj en Pollando 5–9 septembro. Naŭ gotenburganoj partoprenis.	3	La instruista tago de la mondo, la 5an de oktobro	25
Taglibro de vojaĝo al Gdansko, Gdynia kaj Sopot inter 5 kaj 9 septembro 2018	4	La Internaciaj letertagoj – 2018	26
La Albumo pri Pollando	5	Mia ora vojo de Samarkand.....	27
Hejme en Gdansko	14	La revolucio ĉesas mian infanecon	27
”Fluas Torento”, diras la prezidanto de la triurba e-klubo	16	Biografio pri Jascha Golowanjuk.....	28
Anekdotoj el 1904.....	16	Ringokolombo aŭ Palumbo (Columba palumbus)	28
Fredspriset 2018 – La paca premio 2018.....	17	Pri kolombo.....	29
Pri planata Pacmarŝo tra Svedio en 2020.....	17	Inga trovis en Esperanta Retradio	29
Savu la homaron!	18	”Några av oss” ...”Kelkaj el ni”Teatraĵo en Gotenburgo.....	31
Bokmässan – La Libro-Foiro en Gotenburgo	19	Vizito al la gimnazio Schillerska, Gotenburgo, la 12an de septembro	32
Sensa impreso de la Libro-Foiro.....	20	Anekdotoj 2 el 1904.....	32
Pluraj eksponantoj en la budo – ne ĉiujn mi fotis – bedaŭrinde /Siv	21	Okaze de artikolo en Göteborgs-Posten.....	33
Interparoloj kun vizitantoj	21	Nova ZEO en Francio (de Facebook 5/10).....	34
UNESCO en la Libro-Foiro	22	Invito al Aŭtuna kursaro kun Dennis Keefe, programo por infanoj kaj adoleskantoj.....	35
En la Libro-Foiro oni renkontas konatulojn	23	Mitt sjömansliv del 3, Roger Nilsson	35
Pri Gabriel Stille en Varsovio.....	23	Marista anekdotoj.....	39

Pri Ora Ĵurnalo

Ora Ĵurnalo estas eldonata de Ora Klubo, subtena klubo de la esperantolibrejo en Stannum, Östadvägen 68. La eldonfrekvenco estas neregula.

Redaktantoj: Siv Burell, 070-721 34 79, siv.burell@gmail.com kaj Ingegerd Granat, 073-502 53 32, ingegerd.granat@telia.com. Fina paĝaranĝo: Andreas Nordström, arendsian@hotmail.com.

Kontaktu iun el la redaktantoj kiam vi volas viziti la bibliotekon, ili malfermos al vi!



Espeporko konstatas



- ✦ ke la polaj esperantistoj havas similan rozkoloran porkon kiel la Ora-Klubanoj en Svedio por monkolekto
- ✦ ke la Paca Premio iras al Denis Mukwege, ginekologo, kaj Nadia Murad, jazida aktivisto pro ilia laboro kontraŭ sekciaj perfortoj dum militoj kaj konfliktoj
- ✦ ke multaj tagoj estas dediĉitaj al diversaj aĵoj: ekz. 26/9 – la Eŭropa lingvotago, 4/10 – la tago de la cinema bulko kaj 5/10 – la instruista tago de la mondo

- ✦ ke naŭ gotenburganoj ĝuis restadon en Gdansk – Sopot – Gdynia, 5–9 septembro
- ✦ ke 16 gotenburganoj deĵoris en la esperanta budo dum la Libro-Foiro
- ✦ ke entute 372 personoj haltis ĉe nia budo por interparoli pri esperanto, longe aŭ mallonge
- ✦ ke la oktobra birdo estas la kolombo
- ✦ ke Paco estas aktuala temo kaj por la prelego 6/10 kaj por la anglalingva eldono de Savu la homaron!
- ✦ ke materialo por ĉi tiu numero abundas. Pro manko de loko, kelkaj artikoloj devas resti al la novembra numero.

luj diras ke Ora Ĵurnalo havas tro multajn paĝojn. Tro multajn por tuj legi. Mi proponas ke vi printu tekstojn, kiujn vi eble ŝatus, kaj uzu ilin je viaj kursoj. /Siv

Mirindaj tagoj en Pollando 5–9 septembro. Naŭ gotenburganoj partoprenis.



Polaj cikonioj ne estis videblaj dum nia restado, sed tamen la bildo estas mirinda. Ĝi meritas esti sur la unua paĝo pri Pollando. Jaguda sendis ĝin el Pollando, sed skribis, ke nun la cikonioj jam forflugis al Afriko.

Lucina kunvenigis min al artekspozicio. La artistino fotis arbojn, aŭ partoj de arboj kiuj ŝajnis sorĉitaj. Fakte mi gajnis konkurson nomi bildon. Mi elektis la titolon: La ensorĉita ovo.

Ŝajne la mara dio Neptuno, kiu kreis "la oran akvon" regas Gdanskon.

Mi ne estis ebria, kiam mi vidis tiun domon. Ĝi aspektas tiele. /Siv



Taglibro de vojaĝo al Gdansko, Gdynia kaj Sopot inter 5 kaj 9 septembro 2018

Merkredo

La tutan tagon antaŭ la ekveturo pasis kun ekscitiĝo. Mi estis malkuraĝa pri flugantaj aventuroj. Sed kiam mi sidis en la aviadilo mi estis surprizita ĉar multo estas rozkolora: la aviadilo, la uniformoj de flugmastrinoj – sed la savoveŝtoj estis forte flavaj.

Do, estis bona flugvojaĝo kun kafo kaj harmonio! Kiam ni alvenis al Gdansko, Elwira kaj Lucyna kun amikoj renkontis la "flugantan grupon" de Svedio.

La hotelo havis varman atmosferon, sed penigajn pordŝlosilojn. La hotelo proponis "Free WiFi".

Ĵaŭdo

Hodiaŭ estas festotago, tial mi volus renkonti la Dion Neptuno. Li gardas la malnovan urbon de Gdansko per sia tridento.

Estas vera ĝojo piediri laŭ la granda urbostrato, "vivo kaj ĝojo"!

Multe da homoj, ankaŭ klaŭnoj kaj geedziĝantoj troviĝas sur la stratoj. Kompreneble ni renkontis Neptunon kiel statuon sur placo.

Post tiu festo ni daŭrigis al la haveno kaj suriris la ŝipon por vojaĝi al Sopot, la granda banparadizo kun sia ligna havendigo, kiu zumadis de vivo.

Multaj specoj da boatoj kuŝis en la haveno kaj estas ĝojo por ĉiuj maristoj kaj okulĝojo por ĉiuj aliaj.

La tago finiĝis per promenado al la klubejo de la Sopotesperantistoj, tre longa promenado. Post tio ni iris per aŭtobuso al la hotelo kaj



finis la tagon per glaso da vino kaj interparolo.

Vendredo

La stacidomo estis la celo! Hodiaŭ ni vizitu Gdynia kaj renkontu la Gvidanton Henryk ekster la Hotelo kaj poste la eta grupo piediris al la trajnoj.

En la unua vagono sidas Lucyna kun biletoj. La trajno foriras tra antaŭurboj, industriaj ejoj kaj malsimilaj naturteritorioj.

Tuj ni estas en Gdynia kie aliaj gvidantoj marŝigas la Esperantan grupon al muzeo de Gdynia por inaŭguro kaj prelego pri la historio de Gdynia. Poste ni vidis la ekspoziciojn en tri etaĝoj pri la dramatika historio de la urbo kun la okazintaĵoj dum la dua mondmilito. Multe da homoj, infanoj, plenkreskuloj kaj turistoj vizitis la muzeon.

Poste ni marŝis supren sur la monto kie la nova "kverko de Esperanto" kreskas. Ankaŭ granda kruco tie sternas sian brakojn super Gdynia.

Dum la posttagmezo ni vizitis la monumenton de la Kaŝuba Reĝo, Anton Abraham. Du reprezentantoj de la kaŝuba popolo en popolaj kostumoj parolis kaj kantis. Andreo interpretis en esperanton.

Tagmanĝo en la Taverno de Gdynia. La vespero kune kun la membroj de la Esperanta klubo en Gdynia pri la ŝipo Zamenhof kaj kafo kun bonhumora programo.

La penso en mia koro estas: "Esperanto sentas kiel vivŝnuro en Polando".

Sabato

La esperantoklubo en Sopot aranĝis grandan ĉapelparadon. Ĉiuj vestis sin en iuj fieraj esperantistaj identigeblaj vestaĵoj kiel altaj

ĉapeloj, virinaj ĉapeloj, flagoj, balonoj – ĉio en verda kaj esperanta stilo.

Post dekoraciado, la tuta grupo startis. Ĉe la preĝejo aliaj organizoj staris.

Tuj startis la tuta manifestacio per kvar tamburistoj kiuj tamburadis.

Ek al la strando!

Sur la granda scenejo staris viro kun mikrofono, li prezentis la programon, la dancistinojn de flamenko, la premion de iu gajnisto kaj la esperantan miksaĵon de gekantistoj el Litovio, Pollando kaj Svedio.

Kolektiĝo por komuna foto sur la granda ŝtuparo.

Lunĉo, antaŭ ol ni vojaĝis al la Esperanta kverko per aŭtoj aŭ piedpromenis.

Sur la herbejo de kverko la pola grupo faris teatron kaj ofertis ĉampanon.

Estis vere granda festo ĉirkaŭ la kverko.

Granda memorŝildo staras ĉe la flanko de herbejo. Sur la ŝildo mi vidas junan virinon. Ŝi estas sur la herbejo ankaŭ hodiaŭ, sed havas pli da jaroj nun. La tempo foriras kaj ni kun ĝi.

La Sveda grupo adiaŭis la aliajn partoprenantojn sur la malgranda bankedo post la historia filmo pri Esperanto en la regiono.

Morgaŭ ni aviadilos al Svedio.

Dimanĉo

Poste, matenmanĝo, kiu estis grava evento en la hotelo, Elwira kaj Lucyna aliĝis al la Sveda grupo. Lucyna kunprenis la plej bezonatajn en sia aŭto kaj la resto de la grupo venis per tramo al la strando en Gdansk.

La granda strando estas loko por ĉiuj. Malfermita restoracio kun lunĉmanĝaĵo kaj biero. La tuta strando havas molan sablon kaj piediri per nudaj piedoj estas agrable. Mi ankaŭ banis miajn piedojn.

Ĉe la hotelo la aŭtogrupo atendis la "tramogrupon" sub la suno.

Nun estis tempo por veturi al la aerodromo. Kelkaj veturis per aŭtobuso, aliaj per taksio aŭ aŭto.

En la aerodromo estis iom da tempo por aĉeti doganliberajn konfitaĵojn, vinon, likvoron aŭ aliajn aĵojn.

Mi, mia edzo kaj filino sidas en la unua vico ene de la rozkolora aviadilo. La flugmastrinoj donas la sekurecregulojn en la pola lingvo.

Tuj, ni estis en la aero kaj post unu horo mi staris sur la sveda tero.

Mi volis aĉeti poŝtmarkojn, sed en Pollando oni nur vendas tiujn en poŝtofocejoj kiuj situas en anonimaj lokoj kaj estas fermitaj en dimanĉoj...

Mi esperas ke neniu notis ke la ilustrita poŝtkarto el Pollando estis poŝtita en Svedio... /Ingegerd




La Albumo pri Pollando

Lasse observas la sekurecon de la aerodromo. Neniu povas iri rekten en la aviadilon. Estas grava afero!

Kiam ni preterpasis la trueton de l'kudrilo, ni atendas kun nervaj emocioj. Glaso da vino kun amikoj trankviligas. (Bildo sube.)



La amikinoj Siv kaj Ingrid estas esperplenaj!



La aventuro atendas nin. Nun ni eniru en la aviadilon.

→ Tre streĉe! Ni estas survoje!



Alvenintaj en Gdansko! Lasse kaj Christin estas la lastaj pasaĝeroj.

→ Elwira, Lucyna kun amikoj renkontas la svedan grupon. Estas vespero kaj malhele. Elwira kondukas la grupon al la buso.



En la malhela vespero ŝi marŝigas la grupon tra malhela parko. Juna knabino sidas trankvile sur benko kaj legas en sia poŝtelefono. Multaj homoj iras en parko! Ni alvenas al la hotelo. Bonan nokton!

→ Alvenintaj al la fiero urbo Gdansko ni vidas la oldan urbopordon montri sian forton. Ni bonveniĝas en la olda urbo, kiu havas ĉion. Svarmado de homoj kaj surprizaj aventuroj.



Elwira kaj Siv diskutis pri la programo. Temas pri la restanta tago. Ni iras kaj vidas plu.

Siv kaj Ingrid lunĉas sub la ĉielo en la koro de la olda Gdansko. Ĉirkaŭe homoj vendas kaj aĉetas ĉion kaj nenion. La suno brilas kaj la manĝaĵo estas bongusta.

Tiel malgranda oni povas senti sin sur la granda urbostrato kiu estas borderita per altaj kaj oldaj domoj!



La domoj estas kiel solena artaĵo kiu rakontas fabelojn el la historio.

→ Gdasko dum la dua mondmilito. Tute disrompita per bomboj. Dank al Dio la urbo estas rekonstruita.




La Dio Neptunus reĝas sur la vendoplaco kaj multaj turistoj fotas lin.



Ankaŭ la kolomboj serĉas la kuneston de Neptuno.


La juna edziĝonta paro estas atakita de klaŭno, kiu tiras la fianĉon en la orelo kaj kisas la fianĉinon. La klaŭno estas vera ŝercisto.



– Venu, venu krias la fotisto Elwira, kaj ŝia fratino Lucyna reĝisoras. Vidu la rezulton! La bildo, fotite de Elwira estas efektive tre bona!



Supren sur la balkonon la tuta grupo grimpas kiel deziregis la reĝisoro...



Kune kun Neptuno, ankoraŭ majstraĵo de Elwira!

→ La reĝo de sukcesostrato. Ĉu vi volas aĉeti bonan kolĉenon?



La katregino de strato.

– Mi estas laca, mi ne zorgu pri kolĉenoj aŭ orependaĵoj! – Miaŭ!

→ Survoje al Sopoto per boato. Subite ni vidas la memorstatuon kiu memorigas pri la loko, kie la dua mondmilito startis en Pollando.



Sopot distingita de la maro. La urbo de mia songoj!

Nun la ŝipo albordiĝas ĉe la havendigo.

→ La tuta grupo eliris de la ŝipo de Gdansko.



Ni iras sur la granda havendigo sub la blua ĉielo.
Kion vi povas pli deziri...?



Elwira fotas la tutan grupon sur la havendigo.



Harriet, Siv kaj Ingrid ĝuas glaciaĵojn sur kafejo en Sopot.

→ Pauline, Janek kaj Lasse promenas sur la granda placo kun butikoj, kafejoj kaj floroj en la haveno de Sopot.



Domo kun ne rektaj anguloj.

→ La polico gardas en Sopot. Ni estas sekuraj en Sopot.

Bonvolu meti vin en la seĝon!

→ Ankoraŭ uno klaŭno kun balonoj kaj farbita vizaĝo. Plej bone gardi sin!





Torento Esperanta Klubo, la celo!

Daŭrigos en numero 12...

Hejme en Gdansko

Fakte mi sentis min hejme en Gdansko, ĉar multo similas al Gotenburgo. Estas haveno kun grandaj ŝipoj, densa trafiko, nekutima varma vetero, interesaj homoj kaj bestoj.

Unue turka kolombo, kiu ĉiun matenon venis al Lucyna, mia gastiganto, por matenmanĝi.



Due kuraĝa kato, kiu sidis alte en doma fenestro, ne timante subenfalon.

Se urbo bonas al bestoj, ĝi bonas al homoj.

Sube Lucyna sur la balkono kaj ŝia edzo Marek kaj mi. Marek estas artisto kaj faris la pentraĵojn malantaŭ ni.

La domoj malantaŭ Lucyna estas novfaritaj. Partoj de Gdansko estis detruitaj dum la dua mondmilito.

Kiel aspektas loĝejoj de junuloj en Gdansko? Same kiel en Gotenburgo: multe da teknikaĵo sur malvasta spaco. Ŝajnas ke la plejparto de



polaj esperantistoj, kiujn ni renkontis, havas teknikan edukadon. Paulina kaj Janek, ekzemple, ŝanĝis multon en ilia apartamento. La iama blanka muro nun montras la iamajn brikojn. La nepo de Lucyna, kies apartamenton mi ankaŭ vidis, havas grandan TV-ekranon, muzikinstalaĵon kaj komfortajn fotelojn. Muziko gravas al junuloj!



Sube maldekstre la paro Lucyna kaj Marek, dekstre Paŭlina kaj Janek.



Krom Marek, mi ankaŭ renkontis artistinon, kiu havis fotoekspozicion. Ŝi fotis arbojn kaj arboŝtumpojn, sed la arboj aspektis sorĉitaj.



Estis konkurso nomi la fotojn. Mi bedaŭrinde forgesis ŝian nomon.



Fine estas amuza pentraĵo, kiun Marek donacis al la e-klubo. Temas pri Donkiĥoto, kiu anstataŭ glavon portas esperanto-flagon. Mi esperas ke ni ne devas batali kontraŭ ventomueliloj,



kiam temas pri esperanto en la svedaj gimnazioj. Ni invitos Robert Hannah, kiu donis proponon pri tio al la parlamento, veni al la klubo iun Esperanto-Sabaton. Krom la propono estas alia interesa afero: Robert Hannah, kiu elkreskis en suburbo de Gotenburgo, ĵus eldonis libron pri kulturo de honoro kaj problemoj je enmigrado. La titolo estas "Potatisskallen" (La terpoma cerbujo).

Finfine mi ne povas ne enmeti foton pri Elwira. Tiuj, kiuj loĝis en hotelo renkontis ŝin pli ofte ol mi, sed sur la apuda foto ni estas kune. /Siv



”Fluas Torento”, diras la prezidanto de la triurba e-klubo

Tiun ĉi (son)artikolon verkis kaj produktis Andreo Bach el Gdynia en Pollando, 23 sep 2018

Viziti geamikojn

Antaŭ apenaŭ du semajnoj okazis en mia ĉemara regiono laŭvica internacia renkontiĝo en kiu partoprenis sufiĉe granda grupo de eksterlandanoj, se temas pri la nombro de ĉiuj aliĝintoj. Nia asocio ”Torento”, kiu unuigas ĉefe esperantistojn de tri ĉemaraj urboj kaj kelkajn aliajn de proksimaj urboj, organizis jam la sesan fojon sian aranĝon sub la nomo ”Esperanto sur la strando”. Kiam la duono de la partoprenantoj konsistigas eksterlandanoj, tiam la ĝojo estas ege granda.

Tiam ne nur oni povas pli intense praktiki la internacian lingvon, sed ankaŭ intermiksiĝas diversaj kulturoj, kio vekas kromajn emociojn. Tia rekorda nombro de alilandaj gastoj estas laŭ mi la rezulto de kontaktoj, kiujn lastatempe okazigis ankaŭ la membroj de ”Torento” en Svedio kaj Litovio, kiuj sukcesis inviti ilin ĉi tien. Flanke de litovoj kaj svedoj alvenis nome al ni po naŭ personoj kune kun siaj lokaj prezidantoj – la honoro do estis por la organizantoj des pli granda.

Kial esperantistoj decidas dediĉi la tempon, elspezi monon kaj elteni penon vojaĝi multajn kilometrojn por partopreni E-aranĝojn? Tutcerte temas pri la volo viziti geamikojn, kiuj loĝas en alia urbo kaj



nemalofte lando, kiuj parolas la saman neŭtralan lingvon, kio kreas eksterordinaran etoson. Tiu etoso estas nepriskribebbla kaj ĉiufoje iom alia, ĉar kreas ĝin ĉiam pli novaj personoj, kio kaŭzas aldonan scivolemon. Krome nia aranĝo

ĉiujare estis dediĉita al iu konkreta temo, evento, afero, kaj okazis en iom alia loko de nia proksimeco. Mi nur povas diri al vi, ke estis tre agrable kaj amuze pasigi ĉi tempon kune kun esperantistoj.

Mi ankaŭ estas certa, ke ju pli bone oni regas la lingvon, des pli granda estas la ĝojo renkonti E-geamikojn. Indas do ellerni la lingvon kiel eble plej bone. Indas ankaŭ per diligente pripensita programo instigi tiujn esperantistojn, kiuj ankoraŭ ne tro lerte uzas la lingvon, por ke ili intense travivu komunan aranĝon kaj sentu sin instigitaj ripeti siajn kontaktojn kun Esperanto kaj eble plu lerni ĝin. Ja temas pri io fremda, kion oni devas posedi libere samkiel propra gepatra lingvo. Kiagrade ni ĉi-jare sukcesis atingi tian etoson, mi ne scias. Tio montriĝos eble venontjare. Intertempe mi invitas vin rigardi la filmon sub la titolo ”Fluas Torento”, kiun rigardis ankaŭ la gastoj de nia bela – dank’ al ili – renkontiĝo.

Anekdoto el 1904

NIAJ ETULOJ. – Eta Hugo: ”Paĉjo, ĉu la juna leŭtenanto, kiuj venas tie, estas tajloro?”

La patro: ”Ne, mia filo. Kial vi demandas tiel

stulte?”

Eta Hugo: ”Ĉar mi vidis lin hieraŭ mezuri la talion de mia fratino Ebba.”

Fredspriset 2018 – La paca premio 2018



Cecilia Wikström, liberala membro de la EU-parlamento, skribas en Facebook:

Ja! Den norska Nobelkommittéen prisar godhet och civilkurage!

Att årets fredspris går till Denis Mukwege, gynekolog, och Nadia Murad, yazidisk aktivist, för deras kamp emot sexuellt våld i krig och konflikt glädjer mig oerhört. Det är fantastiskt att dessa två personer blir belönade med världens kanske mest kända pris. En värdig utmärkelse!

Ps. Mukwege och Murad har sedan tidigare också tilldelats Sakharovpriset, EU:s pris för tankefrihet som Europaparlamentet delar ut varje år.



Traduko:

Mi ĝojegas, ke la ĉijara paca premio iras al Denis Mukwege, ginekologo kaj Nadia Murad, jazida aktivisto pro ilia batalo kontraŭ sekcia perforto en militoj kaj konfliktoj. Estas mirinde ke ĉi tiuj du personoj estas premiitaj per eble la plej konata premio de la mondo. Digna honoro!

PS. Mukwege kaj Murad antaŭe ankaŭ ricevis la Sakharovan Premion pro penslibereco, kiun La Eŭropa Parlamento disdonas ĉiun jaron.



Pri planata Pacmarŝo tra Svedio en 2020



Sklaveco ne estas historio – Ĝi troviĝas ĉie.
Ankaŭ la rezisto.

El la retpaĝo de BLLF Sweden (Bonded Labour Liberation Front Sweden):



”BLLF estas organizo kiu laboras kontraŭ sklaveco. Ni kredas, ke sklaveco povas malaperi per edukado al ĉiuj, sindikata lukto, justica apogo al bezonataj, virina retaĵkonstruado, kaj disvastigo de informo pri la vojo de sklaveco al libereco.”

Samuel Grönvik de la BLLF-organizo, fondita en 1991, venis al la Esperanto-Sabato la 6an de oktobro. Li informis pri planita pacmarŝo de Lidköping al Malmö kaj poste tra Germanio al la fina celo Genève. La sveda organizo havas kunlaboron kun BLLF en pluraj landoj, aparte kun Pakistano.

La ideoj de Mahatma Ghandi inspiras al NE-PERFORTO. Oni laboras ekzemple pri trejnado solvi konfliktojn paco. La libro ”INGRIP!” (agu!) estas kursmaterialo. I. a. oni kunlaboras kun la studorganizo Sensus.

”Espero en movado” estas la titolo de la prelego de Samuel. La titolo kompreneble plaĉas al esperantistoj. Movi – marŝi – agi! La marŝo trapasu 17 landojn.

Kiel ni povus kunlabori kun BLLF? Ni laboris duope kaj provis prezenti konkretajn ideojn pri la realigo de la marŝo en nia areo... tra Gråbo – Hjällbo – Gotenburgo – Kungsbacka. Oni bezonas lokojn por havi kunvenojn, tranoktejojn, minibuson por personoj, kiuj ne povas iri longajn distancojn kaj flegistinojn por kuraci frotvundojn sur la piedoj. Kompreneble ni marŝu kun la esperantoflago en la fronto! Ni disdonu informbroŝurojn pri esperanto. Entute la marŝo daŭros tre semajnojn en Svedio. En Germanio Samuel povus havi kontakton kun esperantistoj (se li lernus esperanton...jes li komencis la studadon hodiaŭ ☺). Eble Herzberg am Harz estos interesa kunlaboranto.

Multaj ideoj ekis. En la restoracioj troviĝos menuoj en esperanto. Stafetbastono de loko al loko! Oni laborigu aliajn societojn kiuj havas la saman celon! Politikistoj loke povus apogi la ideon. Post la marŝo ni skribu libron pri ĝi, ĉu ne?

Post la prelego kaj laboro en grupoj, ni kiel kutime trejniĝis esperanton. En la komencanta grupo hodiaŭ troviĝis kvin personoj, en la konversacia grupo ok.

La venonta Esperanto-Sabato okazos la 10an de novembro. Tamen la komencantoj havos eblecon partopreni en nova kurso, kiu komenciĝos la venontan merkredon, 10/10 je 17–19h.

Kiel kutime, la Ora-Klubo-renkontoj okazas la 15an en ĉiu monato.

Bonvenon! /Siv

Savu la homaron!

En la angla nun troviĝas la origine svedlingva libro de **Agne Svanberg** – Gemensamma värderingar för att rädda mänskligheten (Komunaj valorjuĝoj por savi la homaron), kiun ni antaŭe recenzis.

Ĝia titolo nun estas ”**Values for a sustainable future**”.

Nun ni esperas ke iu prenu sur sin la taskon traduki ĝin en Esperanton. La

kovrilo aspektas alie ol sur la sveda eldono. Kiel vi volus ke la kovrilo de onta esperanta libro aspektos?

Interesa titolo: Tell us aŭ Tellus.

Jen kelkaj kernoj de la enhavo:

VALUES

1. Strive to treat others as you would like to be treated.
2. Think globally.
3. Work for a sustainable development.
4. Think before every action. What would unconditional love have done?
5. Strive towards a world that does not allow violence to solve conflicts.
6. Work to eradicate hunger, poverty and illiteracy for everyone.
7. Life is music. Play it!



Why are our values so important? Well, we all look at existence through a filter of our values. A task that our brain has is to constantly produce thoughts (otherwise we would not have survived as a species). This flow of thoughts is influenced by our values. By changing the values in a more loving direction, you can gradually change your mindset and thus experience greater harmony and peace.

SPREAD THE MESSAGE!

Best regards Agne Svanberg, Sweden

From www.savecivilization.se you can download the e-book "Values for a sustainable future" free of charge.



BOKMÄSSAN

GÖTEBORG BOOK FAIR

La Libro-Foiro en Gotenburgo, 27–30 septembro, logis centojn da eksponantoj kaj miloj da vizitantoj. Sur la baza etaĝo en Svenska Mässan la komercaj eldonejoj troviĝis kaj sur la unua etaĝo ni kaj multaj aliaj societoj sen profita celo troviĝis. Lastjare



oni nomis "nian" foiron "La Internacia Foiro", sed ĉijare la nomo estis "la Globala Foiro".

Lastjare kaj kelkaj eksponantoj kaj multaj vizitantoj restis hejme, pro ĉeesto de



Ĉiam multega homamaso sur la baza etaĝo – iomete pli aero sur la unua etaĝo.

ekstrema gazeteldonistoj kun ligo al naziismaj asocioj.

Ĉi tiun jaron ekstremaj asocioj ne rajtis eksponi, kaj homoj denove abundis.

Nia esperanta budo, ses kvadratajn metrojn, troviĝis en angulo apud ŝtupareto. Sufiĉe bona loko – H: 01 01! La eksponinto estis Svenska Esperantoförbundet, sed membroj

de la gotenburga klubo deĵoris. Ni notis la personojn, kiuj restis ĉe ni por interparoli. Ni disdonis broŝurojn kaj vendis librojn. 154 viroj kaj 218 virinoj venis. La unuaj 1½ tagoj ĉefe estis celitaj al fakuloj – instruistoj, bibliotekistoj kaj ankaŭ gelernantoj. Junuloj ne scias multon pri esperanto. Do estis aparte interese paroli kun ili.

Sensa impresoj de la Libro-Foiro



Homoj staras en serpentuma vico, kaj estas esperplenaj kiel etaj infanoj por eniri.

Oni ŝvebas sur la nuboj kiam oni vidas egan kvanton da libroj, kiuj amase estas stokitaj en altaĵoj aŭ staras parade sur tabloj kaj bretoj ene en la halo.

Subite antaŭ mia vidado la libroj alkuras al mi, dancas kaj krias: Legu min! Aĉetu min!

La ekspozicia halo estas kiel cisternŝipo, ŝargita per amaso da libroj kaj revuoj. Oni

rapide iras kiel fluganta glitbobeno inter diversaj budoj. Homoj estis atentege aŭskultantaj siajn favoratajn verkistojn, kiam ili vivece rakontis pri siaj verkoj. Homoj plenĝoje aplaudis.

Supre, de la plafono, birdopepado estas aŭdebla. Kelkaj libroj estas malpezaj kiel plumoj kaj aliaj pezas kiel brikoj. La aero odoras malfreŝe, kvazaŭ la halo neniam antaŭe estus ventolita.

Post kelkaj horoj da piedirado la dorso fariĝas pli kaj pli ĝibhava pro la plumbe peza dorsosako kaj oniaj gamboj fariĝis kiel spagetoj. Eble oni kuŝiĝu sur fluganta litmatraco, kaj tujuje tiel oni estus hejme.

/Monica

Pluraj eksponantoj en la budo – ne ĉiujn mi fotis – bedaŭrinde /Siv



Magnus, Margareta kaj Helfrid.



Ingegerd, Harriet, Bodil kaj Helfrid.



Francisco kun vizitanto.



Helén, Inga kaj Ralf.

Interparoloj kun vizitantoj



→



UNESCO en la Libro-Foiro

Unesco estas la eduka, scienca kaj kultura organizo de la Unuiĝintaj Nacioj (U.N.). La Universala Esperanto-Asocio estas unu el la partneroj de UNESCO. Unesco strebas konstrui pacon lige al la solidaj evoluaj celoj, difinitaj en Agenda 2030, akceptitaj de la Ĝenerala Asembleo de U.N. en 2015.

Ingeborg Breines de Unesco havis interparolon kun Tomas Magnusson sur la scenejo de la Globala Foiro. La titolo estis: **La glokala** (nova vorto: globala+lokala) **perforto**

– kaj kiel ni kreu pacan kulturon. Paca kulturo – utopio aŭ sekura politika alternativo, ŝi demandis.

Poste Ingeborg Breines venis al la esperanta budo. Esperanto estas ja partnero de Unesco, kaj mi volis montri al ŝi kiel la esperanta movado en Svedio laboras. Ŝi estas ja el Norvegio kaj ŝi – kaj ni – havis ideon ke eble ŝiaj genepoj venos al nia somera kurso venontsomere. /Siv



Ingeborg Breines venas al la esperanta budo.



Ingegerd kaj Ingeborg interparolas.

En la Libro-Foiro oni renkontas konatulojn



La prezidantino de la Gotenburga regado, la socialdemokrata Ann-Sofie Hermansson (meze), renkontas Ingegerd Granat, ankaŭ ŝi politikistino, tamen hodiaŭ ne tiom aktiva kiel antaŭe.

Ŝi ja havas taskojn kaj en La Esperanto-Societo de Gotenburgo kaj en la Vestrogotia Skribo-Asocio.



Johannes Marainen el la Samea Societo de Gotenburgo sidiĝis ĉe nia budo por iomete legi Ora Ĵurnalo.



Johan Sandberg en la samea vesto ni rekonis de esperanta ekspozicio de antaŭa tempo.

Pri Gabriel Stille en Varsovio



Al nia budo en la Libro-Foiro venis persono, kiu havas la taskon informi pri sveda kulturo al pollandanoj samtempe ke li havas postenojn

kiel lektoro pri la sveda. Li ne parolas esperanton nun.....sed estontece?

Inga Johanson interrete trovis jenan prezentadon de Gabriel Stille.

Pri mi

Post dek jaroj kiel ĵurnalisti pri kulturo kaj

socio, mi nun havas postenon kiel sveda lektoro en Varsovio. Signifas kaj instruado pri la sveda kaj kulturperanta agado, kiu sternas sin ekster la lecionaj ĉambroj. Sur ĉi tiu paĝo troviĝas mia blogo, miaj artikoloj kaj radioeroj.

Gabriel Stille

gabriel@gabrielstille.se

twitter.com/gabrielstille

+46 (0)736878758 +48 (0)796085600

www.gabrielstille.se

La redakcio de Ora Ĵurnalo atendas artikolojn de Gabriel. Kian interesan laboron li havas!

El la tuta mondo sur la Globala Foiro



La evoluo de Sirio estas grava por la tuta regiono, por la fluego da rifuĝantoj kaj por la monda paco.

Pri tio parolis Khaled Alesmael (*plej dekstre*) kaj Reza Talebi (*meze*) kun la intervjuanto, kies nomo mi bedaŭrinde forgesis noti. Eble estas la eldonanto de lia unua libro.

Reza Talebi rekomendis la libron "Syrien brinner" (Sirio brulas). Estas malfacile por ni en Svedio kompreni kio okazas en Sirio. Tamen per tiu libro oni sentas sin pli proksime. Almenaŭ la libro donas bonan bazon por pliaj esploroj de ĉi tiu fora lando.



Pli nova libro estas Selamlık, verkita de Khaled Alesmael. Selamlık estas lia debuta romano. Li skribas svede, sed dum la intervjuo li preferis paroli la anglan.

La ĉefrolulo estas 21-jara Furat, kiu estas geja. Li serĉis la amon en parkoj en Damasko, devis fuĝi, kaj venis finfine al la smolanda vilaĝo Åseda por komenci novan vivon en Svedio. En 2015 li ricevis permanentan permeson vivi en Svedio.

Antaŭ la fuĝo li laboris kun radio kaj televido en Damasko, Beirut, Amman, Kairo kaj Istanbul. Alesmael nun estas ĵurnalisto de la sveda radio kaj televido. I. a. li laboris por "Uppdrag granskning", "Konflikt" kaj la revuo Ottar.



Interesa statistiko pri lingvoparolantoj

trovita en Språkförsvaret (lingva defendo) de Inga

En Svedio 45,9 % parolas unu fremdan lingvon, 31,7 % du fremdajn lingvojn kaj pli ol 19 % parolas tri – aŭ pliajn lingvojn.

La aliaj landoj, kie pli ol 90 % de la loĝantaro scipovas almenaŭ unu fremdan lingvon estas Danio, Estonio, Finnlando, Latvio, Litovio, Luksemburgo, Malto, Norvegio kaj Svislando. Plej multlingvuloj troviĝas en Luksemburgo.

Tie 51,2 % raportas ke ili parolas almenaŭ tri fremdajn lingvojn.

Britio estas tiu EU-lando, kiu havas la plej altan parton de nur unulingva-parolantoj. 65,4% respondas, ke ili ne parolas iun fremdan lingvon. En Albanio, Bosnio-Hercegovino, Bulgario, Rumanio kaj Hungario ankaŭ estas majoritato de la loĝantaro, kiu nur parolas unu lingvon.

La Eŭropa Lingvotago estas celebrata ĉiun jaron post 2002 la 26an de septembro. La gotenburga Esperanto-Societo kutime faras tion, sed ĉi tiun jaron ni ja estis okupitaj prepari nian ekspozicion en la Libro-Foiro.



La instruista tago de la mondo, la 5an de oktobro



Dankon al ĉiuj instruistoj!

Vi havas la plej gravan laboron de la mondo!



LA INTERNACIAJ LETERTAGOJ – 2018

*“VORTO PRI SAMARKANDO: LA URBO PRI KIU ONI ŜATAS PENSI, SONGĪ
KAJ PAROLI”*

Karaj amikoj, kolegoj, samideanoj,

Baldaŭ denove venos la signifoplena dato kaj festa okazaĵo por la urbo, pri kiu multegaj loĝantoj de la planedo ŝatas pensi, memori, revi kaj paroli. **La 18-a de oktobro – la Tago de Samarkando.** La evento, kiu meritas refokusigi nian rigardon je alloga beleco, unika aromo kaj arkitektura dekoro de la urbo, iam nomita la “Perlo de l’Oriento”, la “Lando Dezirata de la Koro”... Ĉiuj, kiuj persone spertis la mirindaĵojn de Samarkando en realo, ĉu de malproksime, ĉu estinte tuj apude aŭ eĉ nur en siaj pensoj aŭ songoj, konservis neforviŝeblajn impresojn pri la grandioza historia heredaĵo kaj neordinara nuntempa kulturo de la mondfama urbo.

Kaj ĉiujare venas la Tago, kiam ni esperas, ke almenaŭ por momento, vi transformos viajn pensojn kaj sentojn en ion kreivan por el la fundo de via animo esprimi – naskitajn fare de via koro kaj enstampiĝintajn en via menso – rememorojn pri tiu ĉi speciala loko. Tio estas eblo por dividi viajn travivaĵojn kaj sentojn, por konigi viajn specialajn spertojn kaj tra tiu ĉi transdono denove fari Samarkandon rendevuejo por homoj kaj kulturoj, tradicioj kaj novigoj, por Oriento kaj Okcidento. Ja ĉiam tiel estis en la pasinteco kaj estu tiel ankaŭ en la estonteco!

Eble por iuj, ununura vorto sufiĉos por esprimi tiun ĉi vizion; iuj skribos personan leteron al Samarkando aŭ verkos saluton forme de poemo, kanto, desegnaĵo; aŭ komunikos siajn bondezirojn aŭ songojn por

la estonteco de la urbo... Kompreneble, ĉio dirota kaj verkota pliproksimigos nin unu al la alia, unuigos nin ĉirkaŭ la eternaj valoroj, pliigos niajn konojn, evoluigos spertojn, plifortigos pacon kaj harmonion – ĉion, kio ebligis al Samarkando atingi la majestecon kaj por ĉiam eniri la historion.

Bonvolu sendi viajn reeĥojn kaj gratulmesaĝojn al nia retadreso: imps86@yahoo.com, kvankam la materialoj iutempe estos akceptataj ankaŭ post tiu ĉi dato.

La plej interesaj kontribuiaĵoj estos publikigitaj en nialanda gazetararo kaj en la venonta eldono de “Konciza Enciklopedio de Eksterlanda Samarkandiana: Kulturo, Unuiganta la Mondon” ktp.

ĈIU ricevita mesaĝo estos danke agnoskita kaj la raporto pri la evento estos sendita al ĈIUJ partoprenantoj.

Atendante vian baldaŭan reeĥon, ni antaŭdankas pro viaj asisto kaj eventuala kunlaboro.

Amikajn bondezirojn el 2760-jara Samarkando, la urbo de Monda Heredaĵo de UNESKO,

Anatoli Ionesov

Enciklopedia Projekto “Samarkandiana”
P. O. Box 76
UZ-140100 Samarkando
Respubliko Uzbekistano
Retpoŝto: imps86@yahoo.com

Mia ora vojo de SAMARKAND

de Jascha Golowanjuk

En mia malnova bretaro staras libroserio, kiu nomiĝas "La Granda Libroringo", kiu inkludas "Mia ora vojo de Samarkand". La libroj estas eldonitaj de la eldonejo Lindqvist 1953 kaj kostis je tiu tempo 6,75 svedajn kronojn. Se oni malfermas la kovrilon, oni vidas la noton "Britta d. 4.11.55". Tiam mi aĝis je kvin monatoj. Britta estas mia patrino, kiu dum mia tuta elkresko prizorgis la hejmon per libroj kaj literaturaj interparoloj kun vendistoj el diversaj eldonejoj. Eble venis mia literatura intereso de ŝi.

Nun al la aktuala libro, kiu temas pri la ruĝa revolucio 1917. Juna rusa artisto fuĝas por savi sian vivon de Samarkand, kiu estis atakita. Estos kiel aventuro kun sabloserpentoj kaj rabistoj en la dezerto, spionoj kaj kaŝmurdintoj, mortfaligiloj, malsatego kaj soifo kiuj minacas la kamelkaravanon, kiu heroe luktas por atingi la liberecon tra Turkeŝtano kaj Karabakumo kaj finfine iras al la Ora Korno (Gyllene Hornet) kaj Bosporen.

NUN ETA ELTIRO EL LA LIBRO:

La revolucio ĉesas mian infanecon

Certe estas treege malmultaj, kiuj povas ekzakte indiki la vivhoron kiam ilia infaneco ĉesiĝis kaj nova epoko komenciĝis.

Tamen mi povas! Por mi ĝi okazis je la tria la lastan majtagon 1917 en Saratovo.

Mi iris kun mia violono sub unu brako kaj pako da notoj sub la alia, survoje al la konservatorio, kie mi studis. La ĉitaga tasko estis la violonkoncerto de Mendelssohn – parkere.

Mia instruisto estis tre severa, kaj mi estis sufiĉe maltrankvila, ĉar la tasko vere ne estis facila por 11-jarulo. En mia kapo sonis la finalo de la koncerto ĉiam denove, kaj mi



supozas ke mi antaŭeniris preskaŭ kiel somnambulo.

Subite mi konsciiĝis pri pafo, kaj aŭdis fajfantan, pepantan sonon, siblantan preter mia orelo.

Tiu pafo kaj tiu momento ĉesis mian infanecon...

Instinkte mi malsuprenigis mian kapon inter la ŝultroj, kaj kiam la unua pafo tuj estis sekvanta de seninterrompa vico de aliaj, mi faris kiel ĉiuj aliaj sur la strato – sen rigardi post min, mi komencis kuri kvazaŭ por savi la vivon kaj ĵetiĝis en homamason, kiu en morta angoro pelis sin antaŭen kiel timigitaj ŝafoj for de ŝakaloj.”

La historio havas timigan kapablon repetiĝi, kaj dum la lastaj jaroj homoj estis devigitaj al fuĝo kun grandaj mizeroj, foren de siaj hejmlandoj. Ĉiun tagon ni renkontas ilin, kaj eble ni ekkomencu demandi al ili kiam iliaj infanecoj ĉesiĝis, kiuj teruraj sortoj ili portas

